

En ce début d'année, j'adresse mon salut à tous les membres et amis de notre Mouvement, particulièrement à ceux dont l'activité apporte à sa vie le dynamisme nécessaire à son développement.

Beaucoup d'entre eux ont certainement donné à l'Espéranto une part de leurs loisirs de l'Eté, voyages, lectures, conversations, rencontres.

Seule, une pratique constante permet de maîtriser l'usage de la langue, d'en faire un moyen naturel d'expression : la reprise de l'activité pour l'année, doit donner place aux groupements, rencontres de voisinage, organisations locales où l'on parle exclusivement Espéranto.

Derrière ces petits efforts se profile le message dont nous sommes porteurs : nous osons à peine imaginer son ampleur. C'est tout un réseau de communications humaines, de rencontres pacifiques, de pénétration des cultures, d'échanges de toutes sortes, qu'il faut construire.

Est-il utopique de penser ainsi ? non, si nous sortons de l'isolement, de la quasi-clandestinité. Il faut de la Radio, la Presse, les relations commerciales, les sciences, les lettres s'ouvrent à l'usage courant de la langue internationale.

Tous ces domaines sont à conquérir; les langues nationales se disputent la priorité des relations de tous ordres. L'Anglais, le Français, l'Allemand, le Russe, se revendiquent des places qui aboutissent à une nouvelle Babel sur le plan mondial.

Loin de moi l'intention de critiquer l'études des langues étrangères au cours des études classiques. Mais la face du monde sera changée si, dans chaque école, la langue universelle était enseignée. Les rencontres multinationales seraient plus profitables; la jeunesse, les mouvements de pensée et d'action y trouveraient les moyens d'une efficacité jamais égalée.

Encore faut-il que le nombre et la qualité, à chaque niveau, des personnes et des groupes, démontrent l'intérêt pratique et la richesse des résultats qu'une possession approfondie de notre langue

.../...

.../...

commune peut apporter à une humanité sans cesse plus ouverte à une unité qui n'exclut pas le pluralisme spirituel, mais veut plus d'amitié, de connaissance, de sympathie au delà et par-dessus les frontières.

R. Cl. COLAS.

XX

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO DE 30-a de SEPTEMBRO 1973

oooooooooooooooooooooooooooo

Ĉeestis : F-ino Vanneau, F-to Marmou, S-roj Barrier; Colas, Despiney, Ligot kaj, kiel observanto, S-ro Valluet.

Petis senkulpigon : S-to Baudry, S-ino Vincent, S-roj Bessière kaj Ribot.

La kunveno okazis en la nova sidejo de UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris kaj daŭris de la 15-a ĝis la 17-a horo.

La prezidanto malfermis ĝin per la preĝo "Patro nia" kaj tuj nome de ĉiuj esprimis sian kontentecon pri la nova sidejo, kiu certe helpos nin atingi pli da sukceso.

I.- Post la legado de la protokolo de la antaŭa kunveno oni ekstraktis la finanĉan parton.

II.- Financoj : 1)- depreno de la ŝparkaso. almenaŭ 3 personoj devas havi rajton konfirmitan de subskriboj sur speciala P.k.T. slipo. Tiuuj 3 homoj estos : la prezidanto, la kasistino kaj la ĝenerala sekretario.

2)- kotizoj : la konsilio rimarkas, ke nun la buĝeto de la bultneo estas sufiĉa, sed tiu de la vojaĝelspezoj ne. La konsilianoj decidis altigi la kotizojn, nome :

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto"	6 Fr-
Infano malpli ol 16-jara	3 Fr-
Membro bonfaranto	30 Fr-
Dumviva membro	120 Fr-

S-ro Ligot sugestas, ke okaze de la kotizpaga periodo oni invitu la abonantojn fari siajn rimarkojn aŭ sugestojn pri la bulteno.

3)- diversaj helpoj : la konsilio decidis daŭrigi la alvokon al donacoj por la Fonduso-Domo. S-ro Despiney raportas pri donaco de PIV al pola pastro je la nomo de nia nacia franca asocio.

.../...

La elacêtitoj de la tero

- Apokalipso 14 - 1/5.-

..." Kaj mi rigardis, kaj jen la Ŝafido staranta sur la monto Cion, kaj kun li cent kvardek kvar miloj, havantaj lian nomon, kaj la nomon de lia Patro, skribitaj sur ilia fronto. Kaj mi aŭdis voĉon el la ĉielo, kiel voĉon de multaj akvoj, kaj kiel voĉon de granda tondro; kaj la voĉo, kiun mi aŭdis, estis kiel de harpistoj, harpantaj per siaj harpoj; kaj ili kantas kvazaŭ novan kanton antaŭ la trono kaj antaŭ la kvar kreitaĵoj kaj la presbiteroj; kaj neniu povis lerni la kanton krom la cent kvardek kvar miloj, la elacêtitoj el la tero. Ili estas tiuj, kiuj ne malpuriĝis kun virinoj; ĉar ili estas virguloj. Ili estas la sekvantoj de la Ŝafido, kin ajn li iras. Ili estas elacêtitoj el inter la homoj, la unuaaĵo al Dio kaj al la Ŝafido. Kaj el ilia buŝo ne troviĝis mensogo; ili estas senkulpaĵoj."

° ° °

Meditado : Ili marŝis, ploris, falis. Ili ne kantis, ke ili estas la "damnitaj de la Tero", ĉar en ilia koro kuŝis espero pli forta ol ilia mizero : ili estas la popolo de Dio, la popolo de la elacêtitoj.

Ili trafis nun la vojofinon, konfesante Tiun, kies nomon ili portas. Mi ankaraŭ ne povas lerni ilian kanton, ĉar mi ne estas senmakula. Sed mi esperas, ke mi kuniĝos al ili, pro via amo, Sinjoro.

(Laŭ "Vie Chrétienne N° 151)



L I N G V A A N G U L O

=====

Al la aprilaj proponoj venis aldonaj tradukoj de S-roj Despiney (D) kaj Lecroisey (L) :

1) rigli sian buŝon (D); eksilentiĝi (L); 2) tio dependas de preskaŭ nenio, ^{nur dependas de kredo (L) - 3) li kavas gajulon. eceron (D), - la ŝajno} etulo, malviglulo (L); 4) fari, ke iu certe kunlaboros (D); 5) la vetero estas malvarmeta (D); 6) nekonsentite (D); neniel temas pri (L); 7) dum 1967-a lia hejmo estis ĉe Parizo, kaj ankaŭ ĉe Versailles (L); gajigulo (D); ŝerculestro, ŝercemulo (L).

La proponoj de la N° 97 ricevis respondojn de S-roj Bourgeois (Bo), Broise (Br), Despiney (De), Guillon (G), S-ino Michau (M) kaj S-ro Ribot (R).

1)- baisser pavillon : kapitulaci, nepre kliniĝi, humiliĝi (antaŭ iu) (Bo); konfesi sin malsupera (Br); cedi antaŭ iu, submetiĝi sub iu (De); ĉesigi sian fanfaronadon (G); .../....

.../...

submetiĝi, cedeme fleksiĝi (M); ĉesigi la fanfaronadon, (re)modestiĝi (R).

2) faire tache d'huile: kvazaŭ oleomakulo etendiĝi (Bo); disvastiĝi kiel oleomakulo (Br); disvastiĝi kvazaŭ oleo (Da); iom post iom gajni terenon (De); larĝskale disvastiĝi (G); oleece etendiĝi (M); oleosimile etendiĝi, disvastiĝi, disfamiĝi (R).

3) faire feu de tout bois : provi ĉiujn eblajn rimedojn (Bo); ĉiel kaj ĝisfine uzi ajnan brullignon (Br); uzi ĉiujn rumedojn (Da); agi per iajn rimedoj (De); profiti ĉian okazon (G); ĉion utiligi, ellasi nenium okazon (M); ĉion (ĉiun projekton) utiligi, ĉion elprofiti (R).

4) jeter l'argent par les fenêtres; disŝuti la monon, fuŝe elspezi (Bo); stulte malŝparegi (Br); senŝpare, senkalkule elspezi (Bo); stulte malsparegi (Br); senŝparema (G); senpripense elspezi (M); malŝpare ĵeti sian monon tra la fenestrojn (R).

5) en être pour ses frais : pagi el propra poŝo (Bo); vane klopodi (Bo, Da); vane elspezinte (Br); malgajni malgraŭ siaj klopodoj (De); nevole preni sur sin la aferon (G); senrezulte klopodi (M); ricevi frapon sur siajn fingrojn (R).

6) se le tenir pour dit : konsideri definitiva, bone noti al si, memse registri ion (Bo); ne atendi ripetadon (Br); opinii la respondon definitiva (Da); ne insisti pri tio (De); memori admonon (G); konsideri diron ne ripetenda (M); ne plu forgesi ian admonon (R)

7) se tailler la part du lion : aljuĝi al si la reĝan parton (Bo); tranĉi por si la plej bonan parton (Br); kvazaŭleone forpreni le plej grandan parton (Da); la plej grandan parton atribui al si (De); preni por si mem la plej bonan parton (G); sin servi plej avantaĝe (M); rezervi al si la partegon de l' leono (R).

Rimarko de S-ro Ribot : la ĉi supra esprimo devenas de la Phedraj kaj La Fontain' aj fabloj. Ĉar la Esperanto-literaturo estas jam grava, ni devas starigi pretan stokon de tiaj parolturnoj eltiritaj el nia literaturo. Supozeble, el Schwartz kaj speciale el "Kiel akvo de l' rivero, ni povas eltiri multe da sukoplenaj esprimoj.

8)- acheter à prix d'or : multekoste aĉeti (Bo, Br); kostege aĉeti (Br); tre multekoste aĉeti (Da); aĉeti por tre granda sumo (De) malavare aĉeti (G); aĉeti senkalkule (M); ion aĉeti orvalore, ortakse (R).

9)- couper la poire en deux : kompremisi (Bo); duone tranĉi la piron, ekzakte duone dispartigi (Br); egaligi la fordonojn (De)

.../...

.../...

partigi pagodiferencon (G); paceme solvi dubecan aferon (M); konsenti pri mutua ofero, pri mutua cedado (R).

10) en faire son deuil : elrezigni ion, antaŭe rezignacii pri io (Bo); antaŭe rezignacii, rezigni ion, konsoliĝi pri la perdo de (Br); funebre rezigni (Da); rezignacie esti sena je io (De); rezigni ĝian esteratan reprenon (G); reziĝne forlasi (M); definitive forlasi projekton, pretendon, esperon (R).

La honormedalon al S-ino Michau, S-roj Ribot kaj Bourgeois.

PROponoj : 1) se porter comme un charme; 2) être dans ses petits souliers; 3) couper les ponts; 4) avoir une dent contre quelqu'un; 5) jeter un oeil sur quelqu'un; 6) parler d'une voix blanche; 7) être dévoré d'ambition; 8) ne pas vouloir se mouiller; 9) il ne l'emportera pas au paradis; 10) rouler sur l'or.

.....

+ Patro Henriko Gerardo Roosen S.C.J.

Ree trafis nian Internacian Katolikan Informojon grava perdo ! Je la unua vendredo; la 2-an de marto 1973 trankvile mortis kaj konfidoplene redonis sian spiriton Patro Henriko Gerardo Roosen S.C.J. en sia lasta hejmo en Asten, Nederlando. Sincere ni povas konfesi, ke tiu foriro de granda amiko estas ne nur dolora, sed ankaŭ post-lasas gravan vundon ! Li naskiĝis en Tilburgo, Nederlando, je la 26-a de majo 1896; fariĝis membro de la religia kongregacio de la Sacerdotoj de la Sankta Koro de Jesuo, kaj sacerdotiĝis la 19-an de aprilo 1924. Dum pluraj jaroj li instruis matematikon al estontaj religiuloj. Li faris tiam sian apostolan laboron per Esperanto kiel flankokupon !

Kvankam lia sano dum la lastaj jaroj malfortiĝis, tiel ke li ne plu povis tiel senlace labori kiel antaŭe, lia viveca spirito daŭre interesiĝis pri la bonfarto de IKI kaj de ĝia revuo "Vojo, Vero, Vivo"; kaj per lasta energio li helpis kune tradukante por "Dokumentoj el Romo". Lia foriro postulas gravan vundon ! Li estis ja la lasta vivanto de la origina komisiono, kiu je la unua de julio 1934 komencis la apostolan agadon de I.K.I.

De tiu komenco li partoprenis kiel teologia korespondanto kaj prizorgis korespondadon mondvestan. Saĝe kaj sagace, fervore kaj apostole li agadis kaj konsilis. Ĉiam li estis preta por ĉia infor-

.../...

.../...

da esperantistoj vivas kaj aktivas en la tuta mondo, supozeble pli ol dek milionoj. Papo Paŭlo VI-a petis la adreson de S-to Jacobitti por resti en konstanta interligo kun li. Dum la aŭtuna sesio de Vatikano II-a estis disdonita al ĉiuj episkopoj, konsilaj patroj, la dokumento "Epistola ad Emin. mos Patres Concilliaires Vaticani II". En tiu ĉi circulerio, skribita latine kaj tre klare, oni vidas klasikan kaj ĉiam aktualan linion de la monda lingva malsameco kaj klarigado pri avantaĝo kaj praktikaj sukcesoj en la uzado de Esperanto ankaŭ por la katolikaj sacerdotoj. En la lasta parto de la letero, oni fervoras por la internacia lingvo Esperanto en la praktiko laŭ konata slogano de papo Johano XXIII-a "por ke ni estu unuecaj". En la lastaj tagoj de 1966 denove la Sankta Patro Paŭlo VI-a akceptis delegacion de esperantistoj, kiun gvidis profesoro C. Agostini. Oni krom alia pridiskutis la enkondukon de Esperanto en la vatikanan radiofonion. Kiel vi vidas, venkis lingvo dekoble pli facila ol la latina, kies gramatiko havas nur 16 reguloj sen esceptoj kaj kiu estas vere genia verko de la varsovia okulkuracisto D-ro L.L. Zamenhof Esperanto estas efektive internacia, kaj tiel belsona kiel franca, itala aŭ hispana lingvo. Esperanto estas helplinvo kun riĉega originala kaj tradukita literaturo, lingvo, kiu jam havas sian historion, kiel lingvo de la "amo kaj paco", Esperanto estas vere lingvo por la bonvolaj homoj, lingvo de la tuthomaj kristnaskaj festotagoj.

Profesoro D-ro J. Nana
 tradukis el la ĉeĥa Francisko Musil el katolika gazeto.

XX

D I S T R A P A Ĝ O
 =====

Solvo de la N° 3.- HORIZONTALA : 1) baritono; 2) avareco; 3) rezedo; km; 4) oliva; ave; 5) mola; omar; 6) e; o; trena; 7) te; kiu; kl; 8) r; krom; ad; 9) optimismo.

VERTIKALE : 1) barometro; 2) avelo; e; p; 3) razilo; kt; 4) ireva; kri; 5) teda; tiom; 6) oco; orumi; 7) no; ame; s; 8) o; kvankam; 9) smeraldo.

.../...

